

La IFA-kursoj kaj la Gastejo Edmond Privat
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 778, 1978.09.07 & 09

Cl.- Salutas el Svislando Claude kaj Andrée Gacond.

La pasintan mardon, 5-an de septembro, disvolviĝis ceremonieto, kiu havas grandan gravecon por nia movado. La fondumo Gastejo Edmond Privat subskribis kan la Komunumo La Chaux-de-Fonds la aktojn koncerne la aĉeton de du domoj. Tio signifas, ke ekde nun la esperantistaro posedas en Svislando la domojn, kiuj permesos iom post iom krei stud-centron kun prelegejoj kaj moderprezaj gastĉambroj. En la menciita aĉetakto la Komunumo La Chaux-de-Fonds listigas kvin aliajn domojn, kiujn ĝi estas preta ankaŭ vendi al la fondumo Gastejo Edmond Privat. Tio signifas, ke se la esperantistoj daŭre pruntodonas la necesajn monsumojn, la domaro esperantista iom post iom etendiĝos.

A.- Kiel estas tiuj ĉi domoj, tion ĉi vi certe desiras scii.

C1.- Ili enhavas po kvin loĝejojn kaj situas en vastaj ĝardenoj. La keletaĝo sude malfermiĝas sur ĝardenajn terasojn helpe de volbaj pordoj, kaj tio permesos facile utiligi tiun ĉi etaĝon por krei prelegejojn kaj manĝejojn. Entute la projekto antaŭvidas 6 kursejojn kaj 6 manĝejojn aŭ kunvenejojn.

A.- La teretaĝoj kaj unuaj etaĝoj enhavas po du loĝejojn triĉambrajn. Ili permesos krei gastĉambrojn du- aŭ unu-litajn aŭ dormejojn por la gejunuloj. Nun jam ekzistas kelkaj el tiuj gastĉambroj je dispono de la esperantistoj.

C1.- La subtegmentejoj loĝejoj estos rezervitaj al la kurgvidantoj dum la kurssesioj, kaj ekster tiuj ĉi periodoj estos lueblaj de feriemuloj. Entute ekzistos 7 tiaj loĝejoj tri-litaj.

A.- Kelkaj loĝejoj estas rezervitaj por la administrejo, por pordista loĝejo kaj por infanĝardeno, kiun kreis la Komunumo, kaj kie la infanoj de la esperanto-gastoj povos iri dum la feriaj periodoj.

C1.- La ĝardenoj, kiuj ĉirkaŭas la domojn, fariĝos parkoj kun benkoj kaj ripozlokoj, kun ludejoj por la infanoj.

A.- Jam kvar loĝejojn okupas Kultura Centro Esperantista en tiuj ĉi domoj. En ili, krom la gastĉambroj, troviĝas du kursejoj, kie jam ekfunkciis pioniraj kurssesioj de Internacia Feria Altlernejo, kaj sekretarioj kaj libroserva magazeno. Fakte Kultura Centro Esperantista ekokupis la du unuajn loĝejojn en 1974, kaj la unuaj kursoj disvolviĝis en somero 1975.

Cl.- Ĉisomere okazis kursoj dum tri sinsekvaj semajnoj. De la 9-a ĝis la 15-a de julio s-ro Giorgio Silfer pritraktis la temon « La fenomeno Esperanto 90 jarojn poste ». Dum la ses venontaj semajnoj vi havos la okazon aŭdi resumojn pri tiu ĉi prelegaro. Giorgio Silfer, anstataŭ analizi la lingvon, la literaturon, la movadon en la nuna momento, proponos analizon tra la tempo kaj bazos ĝin sur la komparo inter la diversaj fonetikaj, leksikaj, stilistikaj kaj konceptaj situacioj evoluintaj dum la unuaj naŭdek jaroj de la lingvo de Zamenhof. Aŭskultante tiun ĉi prelegaron vi iel havos reeĥon pri la riĉeco de tiu ĉi kurso, kiu alfrontis preskaŭ ne esploritajn ĉapitrojn kaj samtempe klopodis rediskuti laŭ pli scienca vidpunkto la jam konatajn evoluŝtupojn de la fenomeno "Esperanto".

A.- La postan semajnon s-ino Perla Martinelli gvidis mezan kurson de Esperanto. Ankaŭ tiu ĉi kurso interesis la partoprenantojn. Ĝi baziĝis sur la studo de tekstoj de konataj aŭtoroj.

Cl.- La tria kurso estis dediĉita al la redaktado kaj stilistiko. Ĝin gvidis de la 25-a ĝis la 29-a de julio s-ro Claude Piron, kiun vi eble konas sub la pseŭdonomo Johán Valano. Esperanton, kiel ĉiun lingvon, oni povas uzi bele aŭ malbele. Por la plimulto de la esperantistoj, ĝi prezentas apartan stilan problemon, Ĉar ĝi estas fremda lingvo, en kies belstila uzo oni ne ekzercis sin lerneje. Krome, la stilaj reguloj dependas de la lingva strukturo, kaj Esperanto havas spiriton tute diferencon de la okcidentaj lingvoj. La kurso konsistis ĉefe el praktikaj ekzercoj destinitaj malkovrigi al la ekzercantoj kiamaniere uzi, kiam oni verkas, ĉiujn eblecojn de la lingvo. Claude Piron pretigos por nia radio prelegaron pri tiu ĉi temo, kaj vi tutcerte malkovros stilproblemojn, kiujn vi emos pliprofundi.

A.- La venontan someron, antaŭ kaj post la Universala Kongreso, disvolviĝos la unua vera kurssesio de Internacia FERIA Altlernejo. Ĝis nun IFA nur eksperimente funkciis. Ni esperas povi organizi samtempe meznivelajn kaj superajn kursojn, tio estas fakaj kursoj kaj perfektigaj kursoj. Transprenis la organizadon de tiu ĉi kurssesio s-ro Giorgio Silfer, kiun vi havos la okazon aŭdi dum la ses venontaj semajnoj. Ni ne estus povintaj trovi pli kompetentan direktoron por IFA.

Cl.- Ekster la kurssesioj la gast-ĉambroj kaj loĝejoj de nia Centro daŭre estas je la dispono de la feriemaj esperantistoj. Jen kelkaj sciigoj, kiujn ni legas al vi el prospekto.

A.- Situo: Gastejo Edmond Privat situas en la montaro Ĵuraso je 1100 metroj de alteco, borde de la urbo La Chaux-de-Fonds, en ege kvieta kvartalo. En tuja proksimeco troviĝas vastaj paŝtejoj kaj arbaroj, facile atingeblaj suproj, multaj promenvojoj. La skilifto Chapeau Râblé kun sia lumigita deklivo vintre invitas al skiado eĉ dumvespere. Alvenas la trolebuso No 6 ĝis je 100 m de la feriejo.

Cl.- Kaj nun pri la litoj kaj restadkosto. Nuntempe jam estas je la dispono de la gastoj 12 litoj: 2 en unulitaj ĉambroj (tranoktado: svisaj frankoj 9.-); 4 en du-litaj ĉambroj (tranoktado: Fr 6.-) kaj 6 duetaĝaj - 4 en unu dormejo kaj 2 en alia (tranoktado: Fr 3.-). Sinlavado okazas en transformitaj kuirejoj. Ne jam ekzistas duŝoj. Ekzistas kuirejo, manĝoĉambro kaj ĝardeno teraso.

A.- Dum la venontaj aŭtunaj kaj vintraj monatoj la ĵus aĉetitaj domoj estos renovigitaj, tiel ke baldaŭ ekzistos pli kompletaj sanitariaj instalaĵoj. Estas antaŭvidite, ke la nombro de la litoj duobliĝos ĝis la venonta somero, sed en unua fazo ĉefe dorme estos kreitaj.

C1.- Ni esperas, ke antaŭ kaj post la venontajara Universala Kongreso okazonta en Lucerno, vi emos partopreni unu aŭ eĉ plurajn kursojn en La Chaux-de-Fonds. Tiam vi petu la detalan programon tra la kanalo de nia radio.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gracond. Ĝis reaŭdo!